ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

SPECIALA ELDONO I MAJO 1949



(Tiun ĉi rakontaĵon ni rekomendas al ĉiuj militinstigantoj.)

PAROLAS PATRINO

Jiří Marek.

Mi rakontas al vi, sinjoro, ĉi tiun rakontaĵon, ĉar vi okupas vin pri verkado kaj ankaŭ ĉar mi opinias, ke estas urĝa tempo, ke ĝi estu aŭdata de pli vasta rondo, ol en mia eterna izoleco. Via tasko estas formi miajn nelertajn vortojn tiamaniere, kiel oni kutimas formi ilin en la belliteraturo. Kaj mi petas vin, donu al la vortoj ĉiun forton kaj ekscitiĝon kaj la tutan malĝojon kaj avertadon, kian oni povas atingi en skribita rakontaĵo. Ĝi estas vere necesa, ĉar poste la homoj eble tamen ekkredos tion, kion mi rakontos.

Mi loĝas en lua domo kiel tute nekonata virino kaj nenion interesan oni trovus sur mi. Preskaŭ neniu konas min. Du fenestroj de mia ĉambro estas frunte al sensuna strato kaj post iliaj kurtenoj mi observas la murojn de la kontraŭaj domoj. Ne estas necese, ke mi havu pli belan vidaĵon el la fenestroj, mi ja tamen rigardas sole en la pasintecon. Unu — dufoje tage la homoj de mia hejmo renkontas min, kiam mi vagas kun mia nigra aĉetujo eksteren, de kie mi baldaŭ revenadas. Mi iras malrapide, mia koro estas malsana kaj tre malfacile mi spiras.

Neniam vi rimarkis, kiom multe da forlasitaj virinoj simile vagas ekstere kaj neniu ilin atentas? La vivo ĉirkaŭ ili ne por ili ekzistas, la montrofenestroj por ili ne brilas, neniu atendas ilin kaj ili tamen vivas, kvazaŭ rande de ĉiuj okazaĵoj, kvazaŭ iliaj ombroj. Kaj tamen ĉio kio okazas ĉirkaŭ ili tuŝas ilin, same kiel tiujn, kiuj la vivon trinkas plenbuŝe. Sed post ili ekzistas io tre peza, ia granda doloro, pri kiu jam neniu ion scias, certe ia perdita vivo, pri kiu oni jam ne parolas.

Tiu maljuna sinjorino el la teretaĝo — oni diras pri mi — iras aĉetadi. Sed unufoje la domservistino ekrigardis la daton de mia naskiĝtago kaj ŝi klakfrapis la manojn: — Vi ja estas ankoraŭ tute juna virino! Tion faras viaj blankaj haroj.

Tion faras multaj aferoj, sinjorino. Kaj juna mi jam ne estas. Mi ofte pensas, ke mi havas jam mil jarojn.

Kaj ŝi ekridis, sed samtempe ŝi rigardis tiom necerte kaj malgaje, kvazaŭ ŝi volus bedaŭri min. Sed pro kio bedaŭri? Mia vivo ne estis ĉiam tia, kia ĝi estas. Ĝi estis ja iam tre bela. Ni vivis bone, mi kaj mia edzo, ni vivis feliĉe, kiam al ni naskiĝis infano.

Cetere vi vidas, ke tiu ĉi rakontaĵo estas neniel interesa, ĉu ne vere, tiajn travivaĵojn vivas tamen miloj da homoj. Kaj mi preskaŭ timas, ke vi rifuzos mian rakontaĵon kaj vi ne skribos plu rakontadon tiom ordinaran. Mi petas vin, estu iomete pacienca ankoraŭ.

Venis la milito. Tio nature ankaŭ estas nenio interesa, ni ĉiuj tion travivis kaj vere ni ĉiuj tro bone scias, kia ĝi estis. Sed fakte ĉu ne ŝajnas al vi, ke ne sufiĉas nur tiom facilanime diri: milito? Ĝi estas nur vorto, nur kelkaj silaboj, kiuj tute ne esprimas, kiom da teruro estas en tiu ĉi vorto kaŝita. Ĝi vere ne estas bona vorto, mi pensas, ĝi estas tro mola: tiu ĉi vorto devus knari, metalbruí, dolori, malodori per pulvo, per sekiĝinta sango kaj tamen ĝi estus ja nenio kontraŭ la realeco. En tiu milito mia edzo batalis. Ne kun armilo en la manoj, tio estis ĉe ni ne ebla, oni kaptis lin, kondamnis kaj ekzekutis pro la partopreno en rezista movado. Kaj mi restis sola kun mia infano. Estas necese, ke vi komprenu du aferojn: la teruron kaj la pezecon de la vorto milito, kiam ĉiu homa laboro perdas sian sencon, kiam la morto sidas komune kun la vivantoj ĉe unu tablo kaj, kontraŭe, la ĉarmon kaj gracion de infano, kiu dormante premas siajn pugnetojn, kvazaŭ ĝi volas kapti perdiĝantan sonĝon. Estas necese, ke vi priskribu ekzemple tian okazaĵon: la suno brilas sur irvojeton en parko kaj meze de ĝi paŝetas infano, ĝi voĉfajfas kaj siblas, movante per sia maneto kvazaŭ per maŝinpiŝto. Kiu diras, ke tio estas irvojeto en parko, kie oni preparas kontraŭbombajn rifuĝejojn, kie sidas silente lacaj homoj, rigardantaj teren? Tio estas ja tamen vagonaro kaj ĝi veturas sur siaj reloj, ĝi estas ja belega aventuro kaj la mondo estas bela, ĉar per unusola movo de la okuloj vi povas ŝanĝi ĝin.

Aŭ se la infano prenas ĉevaleton, kies kapo estas forrompita! En tiu momento la peco da ligno plene ekviviĝas kaj sur ĝia dorso rajdas knabeto kaj lia bukla kapeto kvazaŭ papava kapsulo tremetas, sed li tute ne volas esti delikata, li estas fortulo, li estas kavaliro, li rajdas vojenevoje trans barilojn. Neniam finos tiu ĉi rajdado. Kaj jen subite pasero kaptas lian atenton, la ĉevalo — ligno falas en la sama momento teren kaj ĝi jam estas objekto morta. Tie sur la rando de fenestro pepas pasero. La nazo de la infano surgluiĝas sur vitrotabulon de la fenestro kaj li miras, kial la pasero ne atendis iomete? Kial ĝi eksvingis per la vosteto(Kion diras la pasero, se ĝi ne scias paroli? Post momento denove la multkolora pilko estas multe pli bela ol la pasero, nenio estas tiom bela, kiam ĝi flugas tiom alten, ĝis en la ĉielon kaj denove revenas kaj vere ridinde brufrapas apud vi. (Kaj dume la aĝaj personoj vidas afiŝanoncojn, kiuj signifas militon, suferadon kaj morton.) Kaj la dika fingreto vagas en libro de bildo al bildo, kiuj estas tiom belaj: homoj en aŭtomobiloj, kuĉero kun sia vipo, vaporŝipo sur rivero... Kaj tio jam ne estas la fingreto, ĝi estas kamentubisto, kiu grimpas sur la ŝtupareto, unu du, unu du. „Panjo, kien iros dormi la kamentubisto? Kiu estingas la steletojn? *Estas la suno pli granda ol mia telero?*"

Ĉiuj infanoj estas belaj kaj la plej belaj estas la ekdormantaj, ili falas en siajn sonĝojn kiel en la kusenetojn kaj dum ke ili apenaŭ povas fermi plene la okulojn, sur iliaj lipoj jam vagas „ridetulo"; poste la senkapa ĉevaleto, la pilko kaj ankaŭ la pasero eksidiĝas sur la litorando kaj ili renove vivas, ĉar la beleco de tiu ĉi mondo estas senfina.

Kial mi pri tio ĉi tiom longe rakontas? Ĉar mi vidis mian infanon iri renkonte al la morto.

Ĝi iris kun mirega infanrigardo, ĝi iris konsternita pro ĉio, kion ĝi vidis ĉirkaŭ si, ĝi premis la manon de alia infano kaj ili ĉiuj iris en tia procesio renkonte al morto kaj ili estis tiom malgrandaj, tiom ĉarmaj, tiom senpovaj.

Mia knabeto... Ne, ne timu, mi ne ploros, nur mia voĉo iomete tremetas; la plorado estas jam longe post mi, nur la teruro restis al mi, sed la teruro ne ploras.

Tion ĉi vi devas ankaŭ bone kaj precize priskribi. Ĝi estis senkonsola, nuda regiono kaj dezerta vojo pasis laŭlonge de la reloj, ĝi estis plena de seka koto. Kaj tiun kotan vojon marŝetas infanaj piedetoj, super ili estas marĉkolora ĉielo kaj ĉirkaŭe nenio moviĝas, eĉ ne unu folieto ektremetas, ĉio estas tro terura, eĉ la vento hontas kaj la arboj staras senmove, kaj se ili per siaj radikoj ne estus enkreskiĝintaj en la teron, ili devus forkuri de tiu ĉi loko de teruro. La tuta regiono mutas pro konsterniĝo, fantome, tute nespirante. Nur la procesio iras, la malgrandaj infanoj, kiuj vidis jam tro da teruraj aferoj. Ili iras sen la kriado, ĉar ili ne komprenas tion, kio okazas, ili iras, la tuta longa procesio iras, kvazaŭ ili irus el sia lernejo kaj ili bonmore premas la manon unu de la alia. Kaj tiuj, kiuj gardas ilin, klakas per ferumitaj botoj. Tiel simile vi tion skribu kaj diru: la infanoj iris renkonte al morto.

Mi vidis ilin, kiam oni min transportis kune kun aliaj virinoj en kraditaj vagonoj sur longa senfina vojo al loko de morto, kiun oni nomis loko de la destino. Ĝi estis kruela vojaĝo, ni soifis, ni malsatis, multaj el ni mortis, sed la plej granda doloro estis tio, ke ili forprenis al ni niajn infanojn. La necerteco estis la plej terura: kio okazos pri ili? Ĉu la infanojn ili adoptos? Ĉu ili la infanojn arestos en orfejoj kaj tie ilin multe punos? Ĉio ĉi estis kruela, sed ĉiam sub tio ĉi ĝermis tia pia konsolo ĉion oni povas travivi, elteni, ĉefe, ke la infanoj vivos. Nia vivo jam ne estis grava...

Kaj poste iris laŭlonge de la fervojo la infana procesio, ĝi iris senbrue laŭlonge de la transportvagonaro, kiu staris tie ĉi jam tre longe, la procesio iris bonmore la vojon, sur kies fino fumegis la kamentuboj. Ho, kiel ni algluiĝis per niaj okuloj al la kraditaj fenestretoj de la vagonoj, mi ekvidis la infanojn, sed pli multe, mi ekvidis mian propran infanon. Mia fileto! mi ekkriis kaj en la lasta momento de mia scio mi vidis, kiel li turnis la kapon al la vagono, kvazaŭ li estus aŭdinta min, sed en la sama momento la ceteraj virinoj min deŝiris de la fenestreto, ili ankaŭ volis vidi siajn infanojn kaj ni estis ĉiuj tute frenezaj. Mi kuŝis sur la plafono de la vagono, ili piedpremis min, mi sciis jam nenion, tute nenion. Sed mi poste eksciis, ke el la vagonoj ekbruegis tia lamentado, ke oni rapide ordonis veturi pluen, la ploro de la patrinoj rivere fluis pluen kaj povis ĝin silentigi nek la insultado, nek la batoj ja eĉ ne la pafado.

Poste la virinoj komencis konsoliĝi (ĉar unu afero estas, kiu ne finas, nome espero), ke tio tute ne estis niaj infanoj. Ankaŭ mi onidire ne povis ekkoni mian infanon, ĉar ĝi simple ne estis en la procesio, tiaj hazardoj ne okazas. Tio ne estis niaj infanoj, ili ne povis esti niaj infanoj, ĉar niajn infanojn oni traktos pli bone, oni donos la infanojn en orfejojn, sed lasos ilin vivi.

Ne, tio ne estas niaj infanoj, ripetis la virinoj laŭte, tio estas infanoj tute fremdaj.

Ho, ho, kial do: fremdaj? Kial do niaj koroj povus pro ili preskaŭ krevi?

Do en tia procesio iris mia fileto, ruĝvanga knabeto, mia „ridetulo", kiu zorgis, kien iras la steloj dormadi. Kaj se tamen ne estis li, do estis alia knabeto. Sed la morto estis la sama por ili ĉiuj, morto de infanoj, gvidataj en la procesio, morto de infanoj, sur kies ŝtrumpoj trovas sian truon la polekso, morto de infanoj, kiuj purigas per manplato sian malpuran nazeton kaj havas delikatajn harojn, molajn kiel nesto de paseroj. Ĉu ekzistas entute vortoj, kiuj povus bildigi ĉi tiun teruron? Ĉu estas eble priskribi vere tion, kion la patrinoj en tiu momento sentis?

Kaj plej terure estis, ke mi plu vivis, ke mi ne mortis, kvankam mia koro jam antaŭ longe ekhaltis. La morto versimile hontis rigardi en mian vizaĝon kaj tial mi restis vivanta kaj revenis el ĉio ĉi — revenis. Sed mia fileto ne revenis.

Do jen mia tuta okazintaĵo: mi vidis mian propran infanon iri renkonte al morto.

Dum la milito tia estas la sorto, en la milito ankaŭ la infanoj batalas, diris iu en kunveno. Sed tio ne estas vero, infanoj ne batalas, infanoj nur suferas. Ĉar la batalantoj

en la militoj estas ĉiam nur ne multaj, sed la viktimoj estas tro multaj kaj la suferado estas senfina.

Kial mi tion al vi rakontas? Kial mi volas, ke vi ĉi tiun kruelan okazintaĵon priskribu, malgraŭ ke la homoj certe ekĝemos, ke ĝuste hodiaŭ ili prefere legus pli gajajn rakontojn, pri amo kaj pri belaj aferoj?

Ĉar oni parolas pri nova milito.

En mia soleco certe la milito povas nenion plu disbati, en mia neniaĵo ĝi povas rabi nenion. Sed estas tamen virinoj, kies infanoj vivas kaj ili matene leviĝas kun la sama rideto kiel mia fileto kaj ili ekdormas same lacaj, ili havas similajn ludilojn kiel mia fileto kaj iliajn fruntojn freŝigas la vento de infanaj sonĝoj. Al tiuj ĉiuj vi skribu, ke mi gardas. Ke ankaŭ ili gardu. Ke dum oni parolas pri milito kaj preparas armilojn, mi pensas nur je la krio de la murdataj infanoj. Do ke ankaŭ ĉiuj ceteraj patrinoj pensu je tiu krio. Kaj se mi iras tra la parko, mi ne vidas la infanojn, kiuj ĉi tie ludas, sed tiujn, kiujn la milito murdis. *Mi vidas procesiojn de ekzekutotoj, kiuj sur la sojlo de la morto demandas, ĉu la suno estas tiom granda kiel ilia infana telero.*

Mi bone aŭskultas, kion la potencaj parolas pri milito. Mi, patrino, kiu havas mil jarojn, trapikita per milo da doloroj. La tombojn de ĉiuj miaj infanoj scias neniu kalkuli, ĉar la ĉiuj mortaj estis miaj infanoj. Kaj neniu plu povas al mi redoni unu el ili, kiu karesis al mi per siaj diketaj manetoj.

Milito? Ĝi ne rajtas esti, la paŝoj de la infanoj tamburas por alarmo: *milito devas morti!*

Mia nomo estas Mario, mia nomo estas Katjo, mia nomo estas Rahel, mia nomo estas Penelopé. Mi havas milojn da nomoj kaj mi estas la eterna patrino de la tuta mondo.

Ili parolas pri milito, sed mi ne aŭdas iliajn parolojn. Mi aŭdas la babiletadon de la infana parolo kaj mi aŭdas la krion de la murdatoj.

Mi streĉas la brakojn, rigardu min, mi plene streĉas la brakojn por reteni ĉiun ĉi teruron.

Mi retenos ĝin. Kaj se estos necese, mi metos miajn maljunajn manojn, kiuj jam neniam karesos infanon, mi metos ilin sur la gorĝon de tiuj, kiuj parolas pri milito.

(tradukis A. Malík.)

BEDŘICH SMETANA 1843
(Foto daguerotypio)

BEDŘICH SMETANA 1859
(Laŭ la portreto de Södermark)



BEDŘICH SMETANA 1880

LA PLEJ GRANDA ĈEĤA ARTISTO-KOMPONISTO BEDŘICH SMETANA

(Skribite rememore al la 125-jara datreveno de lia naskiĝo.)

La 2-an de marto 1949 pasis la kvina kvaron-jarcento de post la naskiĝo de Frederiko Smetana, la plej eminenta muzikisto kaj plej granda Ĉeĥa artisto. Oni povus eble pensi, ke ni iom superlativas, ke ni certe havas en nia sektoro muzika aŭ en la aliaj sektoroj de la ĉeĥa arto personecojn pli glorajn, pli talentitajn, kiuj sciis montri novajn vojojn. Sed se ni konsideras ĉiujn eblojn, ni fakte ne trovos duan similan personon, ĉe kiu la spontanea talento estus en tiom brila ekvilibro kun la rezona mensogiganteco de la verko kaj tiom pli malfacile ni trovus komponinton, ĉe kiu lia tuta kreo-potenco estus tiom plenkonscie kaj konsekvence enceligita al kreado de granda arto nacia por prospero de la popolo. Fakte nur malmultaj artistoj meritas la honoran titolon „kreinto", kiun Smetana plenrajte meritas.

Tial ni kredas, ke ankaŭ la titolo: „kreinto de la ĉeĥa muziko" ne estas tro superlativa kaj, ke Smetana ĝin plene meritas ĉar li efektive estas la kreinto de la ĉeĥa muziko, se ni volas konsideri la vorton: fondanto de la ĉeĥa muziko. En la vico de multaj eminentaj unuopuloj de la ĉeĥa muzika mondo, kies tradicio estas tiom glora, ni vidas, ke nur al Smetana estis donite, ke li kreu firman, ekskluzivan kaj absolutan valoron, kiu (en evoluo de la tempo) okupos la lokon kiel NACIA ĈEĤA MUZIKO en la tuta sekvanta muzika evoluado.

Oni vidas, ke malgraŭ la granda tradicio muzika Smetana devas ŝajne el nenio krei propran koncepton pri ĉeĥa muziko. Tio, kion ni trovis pli frue en la ĉeĥa muziko tre valora, kio subkonscie kaj ofte ankaŭ celkonscie ŝajnis esti la tono de ĉeĥa muziko, tamen ne atingis sian definitivan ekskluzivan rezulton. La pure ĉeĥan tonon en la muziko de komponistoj Dusík kaj Tomášek ni aŭdis nur momente kaj sporade, la ĉeĥaj kantoj de komponisto Jírovec aŭ la operoj de komponisto Škroup (aŭtoro de la ĉeĥa himno „Kie mia hejm?") estas nur muziko de ordinara samtempa nivelo, verkitaj laŭ ĉeĥaj tekstoj. Ni devas akcenti, ke la operoj de Škroup, liaj „Dráteníček", t. e. „Dratumĉjo", kaj „Fidlovačka", t. e. „Vilaĝfesto", estas fakte feliĉaj infanoj de sia epoko, kiuj pro siaj popolaj motivoj trovis grandan plaĉon ĉe la popolo, ĉar la muziko donas spontanean entuziasmon al la aŭskultantaro; sed en siaj pluaj verkoj Škroup jam vane serĉas tiun ĉi vojon al la popolo kaj ambaŭ liaj feliĉaj verkoj fariĝas longdaŭra valora escepto. Kaj tiel okazis, ke la venanta Smetana, kiu celkonscie komencis sian linion de komponado, trovis la kampon preskaŭ netuŝitan, kiun ĉiuj bonaj intencoj de entuziasmuloj-muzikistoj en la naci-veka epoko ne kapablis pli efike erpi muzike.

La kontakto de Smetana kun kanto popola, precipe kun danco, estas jam dum lia juneco tre vigla. Li alportas siajn fruktojn de juna komponisto ne sole per siaj ĉarmaj polkoj kaj dancoj de sia juneco, sed lian animon ni vidas precipe en pli postaj pli artaj verkoj de tiu ĉi speco, kiam Smetana celkonscie komponas artismajn stilizaciojn de ĉeĥa polko. Li mem konfesas en sia taglibro, ke li uzas kiel modelojn la mazurkojn kaj polonezojn de la pola komponisto Chopin. La modelo de Chopin estas por la komponado de Smetana tiam la plej influa kaj artiste plej fruktodona.

Ankoraŭ kiel matura majstro sian sindonemon esprimas Smetana al la pola genio tute publike per tio, ke en sia koncerto, en kies programo estis nur liaj verkoj, li tute eksterordinare ludas ankaŭ komponaĵon de Chopin.

Do de ĉi tie, de la parenca slava muziko venis granda helpo al Smetana, kiam li plenumadis sian grandiozan mision. La pola majstro povis doni al li ankaŭ fortajn sento-inspirojn en tiu sfero, en kiu aliaj modeloj por Smetana, eble ne malpli signifaj, povis aldoni al li nur perfektecon technikan. Nur momente ŝajnas, ke Smetana perdas sian vojon, ke li forlasas sian nacion; tiel estis tiam, kiam Smetana interesiĝas pri la granda arto tekste orientita, kiam li kiel siajn pli postajn verkojn elektas temojn: Rikardo la III-a, Haakon Jarl, Mackbeth, Maria Stuart ktp, sed jam en la temo „La tendaro de Wallenstein" li klopodas enkorpigi al la muziko la ĉeĥan karakteron jam kun sufiĉe granda sukceso. Sed kiam komencas en Bohemio kreski perspektivo je memstara ĉeĥa teatro, Smetana, tiam vivanta en Göteborg, forlasas Svedujon k revenas hejmen por ke ankaŭ li propramane helpu al tiu ĉi granda verko. De tiu ĉi momento ne ekzistas laboro, verko de Smetana, kiun li ne dediĉus plene al la nacio, kiu ne strebus pri kultura subteno al la popolo. Tiam komencas en la vivo de Smetana periodo de plej intensa laboro, fruktodona, celkona, kreoforta kaj tiu ĉi krea potenco jam ne forlasas lin. Smetana efektive dum sia tuta vivo ĉerpis el tiu ĉi fonto de nova perspektivo de la nacio kaj li metas ŝtonon al ŝtono sur tiun ĉi konstruaĵon de ĉeĥa nacia muziko. Li laboras ne nur kiel komponisto, sed ankaŭ kiel kritikisto. Ne daŭras longe tiu ĉi lia laboro de kritikisto, sed Smetana konstruas modelon de respondeca laboro kritikista kaj li formulas la ideajn principojn de la ĉeĥa muzika vivo tiel klare, ke ĝi trovos en lia kritik-laboro siajn porĉiamajn leĝon kaj direkton.

Smetana samtempe kreas ankaŭ praktike la unuajn eblojn de memstara ĉeĥa muzika vivo. Li strebas aranĝi ĉeĥajn simfoniajn koncertojn, malgraŭ tio, ke liaj grandstilaj provoj komence fiaskas pro malkompreno al liaj planoj, ĉar ankaŭ li, kiel ĉiu genio, havis multajn malamikojn. Sed liaj simfoniaj koncertoj estis jam la semetoj de la sekvanta simfonia muzika florado, kiun Smetana tiom ege impulsis jam dum sia agado ĉe la provizora teatro en Praha. Kaj ne nur muziko simfonia inspiras lian intereson — ankaŭ horkanta muziko fariĝas kampo, en kiu Smetana diras sian decidan vorton per sia horestrado kiel direktanto de kantista horo en Praha, Hlahol. Same energie li eminentiĝas en sia arto de fortepianisto, ĉar tiu ĉi fako estas same forta ero de lia muzika talento.

Ni alkalkulu lian iniciateman laboron de organizanto, kiun ni povus plej bone konstati dum la fondado de Umělecká beseda (Rondo de artoamantoj), kies unua prezidanto li estis por la fako muzika, ni alkalkulu la elĉerpigan laboron de muzikinstruisto, ĉar Smetana kun sia familio ne povis longe vivi per sia, en Sveduje ŝparita mono, kaj ni ricevos bildon de neelĉerpebla kreadenergio de Smetana, energio tiom bonefika por la ĉeĥa muziko. Publike tiu ĉi laboro kulminas per lia agado ĉe la ĉeĥa opero, kie li funkciis kiel kapelmajstro kaj pli poste kiel artista direktoro, sed lian agadon kronas lia propra verkado komponista. Verko post verko konstruas tradicion de muzika ĉeĥa dramo-kreado, kiu fakte komenciĝis per la operoj de Smetana, sed samtempe jam ankaŭ kulminas. Kaj tio estis kreskado, plenumata per logika konsekvenco, formanta per ĉiu nova verko modelan prototipon de ĉeĥa opero nacia. Ĉu fakte ni trovus pli popolan historian bildon en la ĉeĥa opera komponado, ol kian ni havas en la opero de Smetana Braniboři v Čechách (Brandemburganoj en Bohemio)? Ĉu ni trovos pli genian personigon de simpla kampara vivo ol kian al ni prezentas Smetana en Prodaná nevěsta (Vendita fianĉino)? Ĉu ni trovos kie ajn pli lirikan varianton ol kian li eternigis en la opero Hubička (Kiso)? Kaj same la plej fidelan bildon de etburĝa tempo, montrita per impresa melankolio, li bildigas al ni en la opero Tajemství (Sekreto). Same multvalora estas lia opero Čertova stěna (Muro de diablo) kun respeguliĝo de kavalira romantismo kaj de mistera vivo en ĉeĥaj legendoj, ĉar en tiun ĉi verkon Smetana ensorĉis la plej emociajn esprimojn de sia arda, sed tuj poste de profunda melankolio trablovata lirismo.

Kiu el la estontaj kreantoj de ĉeĥaj konversaciaj operoj povus senatente preterpasi la brilantan varmon de la plej ĉarma opero de Smetana, Dvě vdovy (Du vidvinoj)? En Ĉiuj nomitaj operoj kreis Smetana efektivajn modelojn de sia speco kun absoluta scio kaj sekureco, kia estas donita nur al spirito de klarvidanta intuicio de artisto kaj al konsciiĝanta kreoforto. Kaj tiun ĉi tutan konstruaĵon de siaj dram-verkoj li ligas per arko de sia plej glora, plej nobla opero Libuše. Tiun ĉi operon li kreis por eksterordinaraj momentoj de la nacio kaj en tiu ĉi opero mirinde genie intimiĝas la ĉeĥa mito kun profetantaj bildoj de glora estonteco de la nacio. En tiu ĉi verko, plena da nobla patoso, eĉ ne por momento perdiĝas la homa varmo kaj per ĝi Smetana atingas la supron de sia misio: li fariĝas la profeto de sia popolo, la garantianto de ĝia nacia estonteco. Kaj pli forte kaj pli plene Smetana ĉi tiun sian konvinkon esprimas en la simfonia poemo Má vlast (Mia patrujo), verko grandioza, simfonia ciklo, kiu ne estas trovebla en simila formo en la aliaj literaturoj, kaj vere tiu ĉi verko en sia mirinde muzika kaj idea koncepto estas plene karakteriza verko de Bedřich Smetana. Kaj en tiu ĉi febra, sed logika kulminigado de la giganta verkaro drama kaj simfonia li devas preskaŭ serĉi la tempon por krei kelkajn horkomponaĵojn, kiuj denove fariĝas bazaj ŝtonoj de tiu ĉi sektoro kaj ankaŭ tiuj ĉi horkantoj estas kreataj por la bezono de publika agado; poste li verkas du ciklojn por fortepiano, sed la plenkoran personan konfeson ni sentas en liaj ĉambramuzikaj verkoj. Devas esti tiel, ĉar la sorto de tiu ĉi donanto de vivo-ĝojo kaj de sekureco vere ne estas tiom hela kaj sennuba, kiaj estas liaj verkoj. Smetana estas persekutata de plej tragedia malfeliĉo de muzikisto kaj siajn lastajn dek jarojn de sia vivo li devas travivi estante surda. Sed Smetana plue komponas. En tiu ĉi izoliteco de surdulo li ne trovas trankvilon benitan, sed male li estas pli insiste atakata de sia genio, kvankam nervomalsano lin tre turmentas. Kaj Smetana kreas kantojn de ĝojo, donas la kantojn kaj ĝojon al sia popolo, disdonadas sunhelon kaj ridon kaj senton al sia popolo, donas al ĝi la vivo-pozitivon. La komponado fariĝas por li pli kaj pli granda suferado. Smetana batalas kontraŭ sia sorto, kontraŭ sia malfeliĉo, por kapti momenton de trankvilaj minutoj, necesaj al la laboro, kaj tuj li denove komponas. Verko post verko estas la rezultoj de tiu ĉi lia heroa batalo kontraŭ la sorto kaj ĉiam venkas Smetana super la malsano. La batalo daŭras ĝis li trovas sin en menso vualita, en malheleco de freneza stato.

Mirinde, kiel kun la malĝoja tragika sorto de Smetana tiom akre kontrastas la ĝojoplena beleco de lia verkaro.

Ankaŭ en la momentoj de sia plej granda suferado pro malsano Smetana ne ĉesis ĝojplene takti kun la vivo. Li ĉerpis tiun ĉi sian vivo-pozitivon el sia viva kontentiĝo, ke li alproksimiĝis al la animo de sia nacio pli multe, ol iu ajn antaŭ li. Li estis konvinkita, ke li kreis la muzikan lingvon de sia nacio sur kampo de arta muziko. Ne per tio, ke li imitis la naciajn kantojn, kiel oni konsilis al li, sed per tio, ke li elpalpis la muzikan genion de sia nacio el la spirito de la naciaj kantoj kaj muziko, el la ritmo de ĝia parolo.

Nur de post la Smetana-epoko vivas evidente ĉeĥa tono en la arta muziko de la ĉeĥa nacio kaj ĝi influas la tutan muzikan tradicion de Ĉeĥoslovakio, defendante sian honoran lokon en la tutmonda muzikkonkurado.

KŠ (A. M.)

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo". Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio, telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík, prezid. de IES. Presis: Státní tiskárna (Ŝtata presejo) Praha, Ĉeĥoslovakio.